NIA VOĈO
Madrida Esperanto-Liceo
San Alejandro 6-4ºB-EXT. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)
Ni kunvenas lunde je la 18,30 horo en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas Manolo Parra
manolo.parra@yahoo.es
SEPTEMBRO 2010

**CURSO PRESENCIAL**

A partir de octubre comenzará de nuevo el curso básico de esperanto, los sábados de 11 a 13 horas en el local de la Federación Española de Esperanto, que durará hasta Navidad. Tras las fiestas tendrá lugar un curso de perfeccionamiento. El precio de cada curso es de 20 euros. Los que estén interesados, que se pongan en contacto directamente con Pedro Hernández esperantio@ono.com para poder organizar el grupo.

**EKSPOZICIO** EN "CENTRO CULTURAL SANTA PETRONILA" (VILLAVERDE)

De la 1-a ĝis la 31a de oktobro estos montrata la ekspozicio "Esperanto: desafío a Babel" en la dua etaĝo de tiu municipa kulturejo, kiu situas en strato María Martínez Oviol numero 1, metro-haltejo Villaverde Bajo-Cruce. La ekspozicio konsistas el 16 paneloj pendeblaj, supraĵe montrantaj la diversajn aspektojn de la esperantaj lingvo kaj kulturo. Ĝi jam vizitis Málaga, Guadalajara, Almagro kaj Madrid.

**LIBROJ AL KUBO**

Kelkajn tagojn antaŭ la U.K. ni sendis al Kuba E-Asocio pakaĵon da libroj, pezantan 6,7 kg. La librojn donacis parte HEF kaj parte Madrida E-Liceo, kaj la sendokoston pagis Fundación Esperanto.

**VIZITIS MADRIDON …**
… Barbara Pietrzak, Ĝenerala Sekretario de UEA, fine de julio dum sia reveno el Kubo al Pollando. Darío, Ana kaj Manolo akompanis ŝin dum aŭtomobila promeno tra la ĉefaj madridaj avenuoj.
… Anĝelina Sotirova, el Bulgario, kiu priturismis la urbon aŭguste. Dufoje kelkaj madridanoj renkontis ŝin por ĝui agrablan babiladon.
... Johano Kohler, el Sudafriko, dum tuta septembro pro laboro, same kiel Ismael Ejarque, el Valencio. Ambaŭ vizitis la HEF-ejon la 13an de septembro, en kunveno kie reaperis nia malnova amiko Samuel Adebowale, veninta el Niĝerio antaŭ 14 jaroj.
… la juna zaragozano Eduardo Berdor, de la 23ª ĝis 25ª julio, por lerni el Ana Manero kiel prizorgi kluban bibliotekon. Li estas lerta kaj klera, kaj intencas okupiĝi pri la riĉa biblioteko de la grupo Frateco, katalogi ĝin laŭ profesiaj kriterioj kaj fari ĝin rete alirebla. Gratulon, Frateco!

**AMASMEDIOJ**

La agentejo EFE faris longan kaj favoran artikolon pri Esperanto la pasintan 15an de aŭgusto, mencianta la kongreson en Havano kaj eldirojn de Pedro H. kaj de Toño. Ĝi legeblas en http://www.pe.terra.com/tecnologia/interna/0,,OI4623604-EI12469,00-El+esperanto+se+populariza+gracias+a+la+Internet.html

La tagĵurnalo La Vanguardia en sia papera eldono aperigis la 25an de aŭgusto favoran artikolon: http://ves.cat/aiX4
Dankon al Joan Inglada.

En la regiona radio de Aragono, "Aragón Radio" la 23an de septembro oni parolis pri Esperanto, kun la partopreno de Pedro Hernández kaj Eduardo Berdor.

**EN HISPANIO**

De la 2a ĝis la 9a Oktobro 2010 okazos la 18a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo en Coma-Ruga (El Vendrell, Baix Penedès, Tarragona). La kongresejo kaj loĝejo estos la Hotelo Natura Park***

La 15a Andaluzia Kongreso de Esperanto okazos ĉi-jare en Jaén inter la tagoj 30a de oktobro kaj 1a de novembro 2010. La kongresejo kaj loĝejo estos la Junulara Gastejo de Ĥaeno.

**TRA LA MONDO**

15 gastoj el Ruslando dum rondvojaĝo tra Eŭropo vizitis la Esperanto-urbon, Herzberg am Harz (Germanio) . Multaj estis surprizitaj pri la surstrataj kaj instituciaj, okulfrapaj Esperanto-rilataj atingaĵoj en la unua oficiala Esperanto-urbo de la mondo. Fotojn pri la mallonga sed programriĉa vizito de la rusa grupo vi trovas en la retalbumo de http://esperanto-urbo.de

Amike kaj samideane salutas, Petro Zilvar Zsofia Korody Harald Mantz.

MEDITERANEA ESPERANTO-SEMAJNO – 2011, 26-A DE FEBRUARO ĜIS 5-A DE MARTO 2011 AGAY - FRANCIO - LAZURA MARBORDO

Se ankoraŭ frostas en via regiono, venu al la Mediteranea Maro, kie floras mimozoj kaj migdalarboj. Vin atendas amika, familia etoso, belegaj pejzaĝoj, bona ripozo kaj lazura maro!!!

Vi povas plibonigi vian nivelon de Esperanto partoprenante en kursoj. Gvidantoj de kursoj estos: 1a Kurso:. Stano Marĉek. 2a Kurso: Augusto Casquero. 3a Kurso: Spomenka Štimec

Posttagmeze, vi mem elektos vian programon: promenado, piedirado en montaro Esterel (kunportu viajn marŝŝuojn), familia vivo ĝis la vespero. Distraĵoj. La studejo estas komforta hotelo "Le Renouveau" en Agay (ĉe Saint-Raphael). Francio.

Informoj kaj aliĝoj : Monique Prezioso, 92 alleé des Harkis, FR 83700 Saint-Raphael, Francio, rete: prezmoni ĉe hotmail.com; aŭ Christine Graissaguel, Les Iles d'Or, rue du progres, FR 83600 Frejus.

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

Niaj **konversaciaj rondoj** okazas ĉiulunde ekde la 18:30 h en la HEF-ejo, strato Rodríguez San Pedro 13-3º-7, tel. 914 468 079.
Por sporadaj renkontiĝoj oni alvokos per la retlisto "esperanto-madride".

****************************************************************************

**ESPERANTO LICEO DE MADRID**
Asociación de Utilidad Pública Municipal
San Alejandro 6-4ºB-EXT
28005 MADRID